

PENSEO

N-ro 275

sept. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



duŝo

pluvo artefarita ŝprucas el la lotusfloro.
pro la kvar lampsunoj mi varmeton ĝuas.
sub la piedojn junaj la makuloj fluas
kaj tiuj jaroringoj frunte belas jam kiel dekorato.

2012.10.24 - 18



sen baro

dum monato pluvas; pensas mi sen psika baro,
ke la suno kun belino vivas ekster la nubaro.
tage la korpo restas en alometujo, tamen
nokte mi vojaĝas kiel barono münchhausen.



Munchausen rides on a cannon ball

2012.10.25 - 2

geratoj sterilaj

geratoj sterilaj rabis. al mi librojn fiziologiajn.
kiel budho mi ilin akceptis.

leginte miajn versojn en la komputilo,
la edzino gravediĝis kaj kun sia edzo kuris for.

2012.10.26 - 14

rato kaj muso min suferigis

rato amoris muson antaŭ kamerao
en mia ĉambro, kio aŭtomate enretiĝis.
policanoj min arestis kaj akuzis
pri disvastigo de pornaĵo. ho ve, lam-erao!



2012.10.26 - 26

Nazaré Laroca (Brazilo)



Sagao

Filino de l' sun' deĵoras,
malantaŭen ne rigardas:
ĉar krias en la memoro
fajra kolono el salo.

Humidas la infanaĝo
en la korto, kiu gvatas
la lirlon de la rivero.

Ĉiuj akvoj havas celon
kiam forportas la tagojn
tra inter la ŝtonoj akraj.

La tempo de l' knabin'

figuras tristajn okulojn,
kiuj tutpene forfuĝas
el frenezo de l' onkloroj.

Ĉar ili dum ĉiuj ŝtormoj
plenkovras siajn spegulojn
kaj falas sur la genuojn
en preĝo kontraŭ la fulmoj.

Hodiaŭ amo burĝonas:
la sunon plantas virino
en la karnon de la vortoj
por reinventi la vivon.



Juiz de Fora, 06/08/2014.

Mori (Usono)



Praparolo

Unufojon mi faris pekon
oni priparolas
ĉiam,
Milfojojn mi faris bonon
oni priparolas
NENIAM!

SIMPLECO

(kanzono en la persa lingvo, Kantisto; Shahram Shokoohi)

Antaŭ longa tempo
estis amo, mankis malamo
se manĝotabloj malplenis
en la koroj abundis amo
noktoj estis plenaj je luno kaj lumo
koroj plenis je "sang-e-saboor" *
vespermanĝoj estis preteksto por
ĝojo kaj festo!

Kie estas nun simpleco?

Kie estas amo?
nia manĝotablo, ho amiko
estas simpla, senpretenda!

Se nia manĝotablo estis simpla,
ni kutimis kisi la manon de paĉjo
kaj dankesprimoj al Dio estis sur niaj
langoj!

Ni malfermu niajn korojn
kaj ni trovu en la koroj malĝojn
ni anstataŭigu ĝin per
amo kaj sincereco en ĉies koroj
Kie estas simpleco?
kie amo?

Nia manĝotablo, ho amiko
estas simpla! Senpretenda!



* "sang- saboor" kies signifo estas ŝtona pacienco, estas persa esprimo por homo kun kiu oni povas babili kaj li/ŝi paciencie kaj plej zorgeme aŭskultas viajn problemojn kaj malĝojojn.

Paŭlo Silas (Brazilo)



AMI MILMANIERE

Surprizo, se al seks' allogas samseksulon,
Se iri laŭkonvene kaŭzas nur torturon;
Se staras ili malsimile al aliaj
Kaj montras sin malsamaj formoj familiaj.

Milmaniere oni amas kaj respektas:
Akvumi floron, kiu en ĝarden' perfektas.
Domhundon varti per atento senriproĉa.
La malsanulojn nekonatajn flegi do, ĉar

Meritas ankaŭ ili homdonitan zorgon.
Ĉu nei al la samseksama sent' apogon?
Permesi ne devus ni tian cenzuron.

La mondo jam plenas je kompren-simulo.
Skandalas pli ŝajnigoj laŭsitaciaj
Ol spiti banalaĵojn bonreputaciajn.

Denise De Val (Brazilo)



Citadelo

Mi konservas vin...
La senhoman straton,
malplenajn placojn,
miajn pensojn.
Miajn malfermitajn vundojn,
noktojn, la vitejojn...
dezirojn, turmentojn.

Mi amas vin...
La molan liton,
la venteton elflue
el viaj internaĵoj.
Viajn odorojn, karesojn,
rozajn plezurojn.
La noktojn kaj matenojn.

Kaj serĉas en via ĝangalo
la fonton, la floron, la ĝardenon.
Sorbas vin, kaj jen rozo burĝonas:
la aromo, la karmezino...
Mergas en vian ampleksan puton,
la anim' sindone: festeno!

Kun certeco vian kontentiĝon,
viajn kriojn, viajn ridojn
mi liveras, kio estas via.
Reiras la iaman vojon,
vekas en vi la dormantajn angulojn,
viajn fontojn el pura mielo,
kaj kunsentas la amoremon.

Kaj kiam la nokto,
laca de viaj deliroj,
plonĝos en dormofundon

via animo langvore vekigōs
por ebrigi mian animon
reen en la havenon de viaj brakoj.

Mi revenas al via ĝangalo,
al la fonto kaj floro kaj ĝardeno,
kaj perceptas vin, viglokulan,
vangoruĝan: karmezin'!
Dronigas min en vian ampleksan puton:
Vi estas vivo kaj vivas en mi.

Erzsébet Tuboly (Hungarujo)



Meze de Aŭgusto

Flave paliĝas
la herbejoj kaj kampoj.
Malsanas somer'.

Facila nebul'
kovras la tremetantajn
rosperlajn florojn.



Siv Burell (Svedujo)



La ombroj de la vespero

Je sunsubiro
ombroj plilongiĝas
kaj kun ĝoja miro
vidiĝas,
ke etulo nun gigant'
kiel elefant'
ludas sian ludon
kaj donas la konkludon:

Ne estas homo en si mem,
 kiu estas alta aŭ malalta
 la ĉirkaŭaĵa zorgem'
 decidas pri memfid' de ul'.
 Do, donu al proksimul'
 lumon, kiu grandigas lin !
 Lasu al estaj' senti sin giganta
 kun spirito pli vivanta !
 Ankaŭ vi, amik' iĝos do kreskanta.



Vitor Mendes (Brazilo)



Metamorfozo en Movad'

(kantteksto)

Mi preferas esti
 Tiu metamorfozo em movad'
 Mi preferas esti
 Tiu metamorfozo en movad'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 La mia dirado
 Nun malas al la pasinta dirad'
 Mi preferas esti
 Tiu metamorfozo en movad'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Pri esto de l' am'
 Pri la mi' ĉiam malsam'
 Se estas nun mi stelo
 Morgaŭ ĝi ne estos pli
 Se mi vin nun malamas
 Morgaŭ estos am' al vi
 Jen am' al vi
 Malam' al vi
 Amoras ni

Aktoras mi.
 Ja tedas alven'
 al iu celo pro ada pensad'
 Mi preferas vivi en ĉi metamorfozo en movad'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Pri esto de l' am'
 Pri la mi' ĉiam malsam'
 Se estas nun mi stelo
 Morgaŭ ĝi ne estos pli
 Se mi vin nun malamas
 Morgaŭ estos am' al vi
 Jen am' al vi
 Malam' al vi
 Amoras ni
 Aktoras mi.
 Mi maldiros ja
 Kion mi diris dum foja dirad'
 Preferas mi la
 Mian metamorfozon en movad'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan la malnovan opinion
 Pri ĉiu afer'
 Ol mi havi la malnovan opinion pri ĉiu afer'.



Georg Heym (1887-1912)



Viaj okulharoj, la longaj

Viaj okulharoj, la longaj,
 akvoj mornaj de viaj okuloj,
 lasu min sinki en ilin,
 lasu min iri profunden.

Grimpas la ministo en la ŝakton

kaj ŝanceliĝas ties trista lampo
super la pordo de la ercoj,
alte sur la ombra vando,

Vidu, mi grimpas profunden
por forgesi en via sino
en la foro tion, kio de supre muĝas,
la helon, turmentojn kaj la tagon.

Ĉe la kampoj kunkreskas,
kie staras la vento, ebrie de l' greno,
alte dornoj, altaj kaj malsanaj
kontraŭ la ĉielblu'.

Donu al mi la manon,
ni kunkresku
al predo de l' vento,
kiel sola birdoparo fluganta.

Aŭdi somere
la orgenojn de la lacaj fulmotondroj,
bani en aŭtuna lumo
ĉe l' bordo de l' blua tago.

De tempo al tempo ni staru
ĉe l' rando de l' morna puto
por vidi profunden en la kvieton,
por serĉi nian amon.


Aŭ ni elpaŝu
el la ombro de la oraj arbaroj
grande en vesperan ruĝon,
kiu tuŝas al vi softe la frunton.

Dia malĝojo,
silentu pri l' eterna amo,
levu la kruĉon,
trinku la dormon.

Foje stari ĉe la fino,
kie la maro flavece makulita
naĝas jam mallaŭte
en la golfon septembran.

Supre ripozi
en la domo de la raraj floroj,
ĝis trans la rokojn malsupren
kantas kaj tremas la vento.

Sed de la poplo,
kiu elstaras en la eternan bluan,
falas jam bruna folio,
sur via nuko ĝi ripozas.



Tradukis



**Donjo kaj Cezar
(Germanio)**

G. Conte, M. Martini y D. Baldán
(kantteksto)

Mi amas vin

Tremas vi, amata,
samkiel guto delikata.
Mi amas vin.
Mian plej profundon
vi trafas kiel pluvo grundon.
Mi amas vin.
Kvazaŭ fremda homo
vi ĉiam spicas mian nomon.
Mi amas vin.
Ŝajnas vi hedero
sur mi grimpanta kun tenero
Mi amas vin.
Vi estas vento ne impeta,
vi estas peza sed diskreta,
fajra kaj glacia
vi estas, tial, kara mia,
mi amas vin.
Mi amas vin.
Viaj flustraj vortoj
regalas min per freŝaj fortoj.
Mi amas vin.

Kaj mi iĝas pura
tutsame kiel akvo kura.
Mi amas vin.
Vi vortigas amon
kaj brulas mi en vorto-flamo.
Mi amas vin.
kaj mi iĝas bela
samkiel tago splende hela
Mi amas vin.
Vi estas maro kolerplena.
vi estas nokto plej serena.
Estas vi rivero
el kiu ĉerpas mi liberon.
Mi amas vin.
Apud mi eksidu
kaj mian koron blinde fidu.
Mi amas vin.
Restu ĝis aŭroros,
la amo certe nin favoros
Mi amas vin.
Vi estas suno leviĝanta.
Vi estas spiko aroganta.
Fajra kaj glacia
vi estas, tial, kara mia.
Mi amas vin.

Kaj mi iĝas bela
samkiel tago splende hela.
Mi amas vin.
Fajra kaj glacia
vi estas, tial, kara mia,
mi amas vin.



Kantas Ana Belén

Tradukis:




Svena Dun (Hispanio)

Cesare Pavese (1908-1950)



Vi ne scias la montetojn

Vi ne scias la montetojn,
kie disverŝiĝis la sango.
Ni ĉiuj forfuĝis
ni ĉiuj ĵetis
l'armilon kaj la nomon. Unu virino
rigardis nin forkuri.
Nur unu el ni
haltis kun pugno fermita,
ekvidis ĉielon vakua,
klinis la kapon kaj mortis
ĉe muro, senvorte.
Nun li estas ĉifono de sango
kaj sia nomo. Unu virino
nin atendas ĉe l' montetoj.



Esperantigis



Helen Tylipska (Italujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Fiŝisto kaj monstro

—laŭ ĉinesko Zhuzhici*

Antaŭe ĉiutage
fiŝisto ĵetad-age
kaptis fiŝojn surmare
kaj revenis plenpake.

Foje laŭrutine li
ĵetis reton fojojn tri,
sed je lia desapont'
en ret' troviĝis neni'.

Je la lasta ret-eltir'
li trovis reton kun mir'
tre peza kiel rokeg'
kuŝas firme sen deŝir'.

Li eltiris kun anhel'
la reton kun bronz-botel'
strikte fermita plumbe
per Salomona sigel'.

Li ĝin ovris tranĉile,
fum' leviĝis palbrile
el ĝi ĝis alta aer',
kirligis nub-simile.

Aperis monstr' minaca
al li trema kaj laca
rikanis kaj kriaĉis
jen per voĉo aŭdaca.

Monstro falis subite
sur genuojn, ekscite
petis al la ĉielo:

“Ne min mortigu spite,

Ho, reĝo Salomono!
Mi al via ordono
ne plu turnos la dorson
kun obstina opono.”

Tuje venis al kompren'
fiŝisto sen ajna pen'
kaj kuraĝe demandis:
“La reĝ' jam en mort-katen'

antaŭ jaroj mil ok cent.
Ĉio en nuna moment'
jam tute ŝanĝiĝis, do
kial vi enas por pent'?”

“Vi malbeninda ulo,
se vi plu kun ululo
maldece demandas min,
mi tuj faros vin nulo!”

La fiŝisto rapide
ĉuis al li malride:
“Kial vi min mortigos?
Ĉu mi agis perfide?”

“Ĉar vi min jam savis nu,
krom vi, al neniu plu
mi rakontu la jenon:
antaŭe kun granda ĝu'

mi ja per malbona far'
kaj ribela kontraŭstar'
ne obeis al la reĝ',
li do pro mia erar'

enmetis min kruise
en botelon forpele,
ĵetis ĝin en la maron
por fermi min karcere.

Enmare cent jarojn mi
Loĝadis, kaj pensis pri

Mia saviĝ' el botel'
Kaj forlas' de tie ĉi.



Se iu min sen motiv'
savos, mi dum lia viv'
faros lin pompe riĉa
kun lumbrila perspektiv'.

Cent jaroj jam pasis, sed
neniu venis en pret'
elsavi min favore
eĉ per malsaĝa rimed'.

Pasis kvar cent jaroj pli
neniu venis al mi
liberigi min elen
kun malgranda simpati'.

Tiam mi pensis ĵure:
kiu savas sekure
min dum ĉi tiu horo,
mi permesas lin nure

elekti l' vojon de mort'.
Nun alvenas via sort',
vi elektu laŭplaĉe
kiel morti en bonord'!"

la fiŝisto silente
ekpensis dummomente
kiel ja elturniĝi,
kaj parolis talente:

“Jes, mi mortos laŭvole.
La boteleto sole
kiel vian korpegon
entenas ja strangole?”

la monstro tre malsaĝe
enŝovis sin kuraĝe
en botelon tujtufe
volvis sin sendamaĝe.

La fiŝisto senmorne
tuj ŝtopis nekonsterne
la botelon, ĵetis ĝin
en maron por eterne.

adaptita el *Mil kaj unu noktoj*

13-08-2014

**Zhuzhici (Bambuoj): ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Jadranka Miric (Serbujo)



Gaja kanto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Muziko,
vinokoloro
ebriigas animon.
Tre ĝojas mia koro
pro bonhumoro.

Papili'
tuŝo tenera.
Jen kuniĝo miela.
Ĉi rakonto somera
amfloro vera.

Aŭroro.
Ĝojo al natur'.
Matene kelkatempe
post vizito al tur'
plaĉas ŝipvetur'.

Mistralo.
Kvietas maro.
Velŝipo moviĝanta
kaj fluganta birdaro.

Blanka mevaro.

Ŝipsoido
sur horizonto,
kiu jam punktiĝis.
Kiel fumo el pipo
aŭ imag' vipo.

Reta vojaĝo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ĝuo dum
somerferio.
Neforgesebla afer'.
Reta vojaĝ' al rio.
Ĝoja ekkrio.

Post tiu,
sekva semajno
pasis melankolie.
Vojaĝ' per reta trajno
jen, nova gajno.

De lumurb'
trans oceanon
survoje al ĉinio
ĉiuj bezonas panon
kaj savo-manon!

Reveno
al ĉiutagec'.
Vekiĝas emocioj.
Ve, tias retamikec'
sen ci amarec'.

Dankon al
retamikaro.
Mondo eniris domon .
Pro ambaŭ bonfaro
ĝojas anaro!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Andrej Ĉerņiŝjov

Vezikoj

En parko en duonruiniĝa benko inter falintaj aceraj folioj grizhara homo sidis.

Liaj okuloj estis kaŝitaj post dikaj vitroj de okulvitroj, kolo estis envolvita per granda kvadratita skarpo, kolumo estis levita, kaj kaskedo estis mallevita preskaŭ sur okuloj.

La homo estis ĉiamulo de parko. Knaboj, kiuj estis ĉi tie multe, sciis lin delonge. Ĉiu tago je la kvina horo li aperis en vojeto de parko, malgaje kaj ritme iris en centron de parko al benko nemulte lamante kaj apogante sin per bastono. Poste li sidiĝis, mediteme fiksrigardis ĉirkaŭajn arbojn kaj arbetojn, kvazaŭ provante ekvidi inter ili ion novan por si, prenis el profunda poŝo de griza mantelo malpuran pro tempo kajeron kaj komencis legi malofte movante lipojn. Knaboj ne sciis, kion estis skribita en la kajero. Ili kuregis preter la maljunulo, preterveturis per rulglitiloj, skutiloj, bicikloj... Iliaj okuloj dum tio obstine rigardis en kajeron, ili volis kompreni: "Por kio la maljunulo pasigas tiom tempon en parko? Kion li legas en sia kajero en ĉiu tago, ĉiam en la sama kajero?" La homo kapoklinis je respondo post iliaj gajaj salutoj, ne kaŝis la kajeron, sed knaboj ne povis legi en ĝi ion flugante preter.

Knaboj delonge humiliĝis pri lia ĉeesto en ilia teritorio, konsideris lin kiel sian homon, eĉ defendis lin kontraŭ ebriaj viroj, kiuj tedis ĉiun solan homon kun konstanta propono "drinki kun ni".

Hodiaŭ matene pluvis, pluvo ŝmiris kiel per oleo flaviĝintajn foliojn. Pro tio folioj brilis en lumoj de malvarma aŭtuna suno kiel la oraj. Ĉirkaŭ benko estis flakoj. Tamen tio ne malhelpis al la maljunulo aperi en parko en kutima tempo. Li sidiĝis sur benkon kaj

malfermis sian kajeron malferminte super kapo pluvombreton.

...Ĉirkaŭe malgraŭ pluvo lokaj knaboj kuregis ludante siajn, ne kompreneblaj al la maljunulo, ludojn.

Iu knabo haltis apud benko kaj afable kriis al la maljunulo:

– Saluton! Hodiaŭ estas malseke, flakoj estas en tuta parko kiel minkampo! Tie apud florbedo iu elŝutis karbidon, ĝi vezikiĝas en flako kiel skafandristo sub akvo!

– Saluton! – la maljunulo rigardis knabon.
– Ĉu, vi parolas, ĝi vezikiĝas kiel skafandristo?

– Aha! Kaj tiel forte!

– Ĉu vi iam vidis skafandristojn?

– Ne-e. Ĉi tie ne povas esti skafandristoj. Mi vidis ilin nur en kino kaj en televidilo!

– Ĉu maron? Ĉu vi vidis maron?

– En televidilo. Sed per siaj okuloj neniam. Ĉu vi? Ĉu vi vidis?

– Hm... Ĉu mi vidis? Jes, mi vidis maron kiel vin, eĉ pli proksime. Mi vidis ĝin dum multaj jardekoj. Mi oficis en floto... Delonge... Nun mi estas pensiulo, sed delonge...

Kaj la maljunulo mediteme ekrigardis la knabon, poste flakojn ĉirkaŭ benko kaj mallevis rigardon al kajero.

– Onklo! Rakontu! Ĉe ni knaboj neniel povas kompreni – kiu estas vi? Kion vi legas? – knabo pleniĝis per kuraĝo. – Interese!

– Pri kio vi volas ekaŭdi?

– Nu pri maro, pri skafandristoj...

– Bone, mi rakontos. Sed nun pluvas, mi ne povas longe rakonti. Mi havas pluvombreton, sed vi tute malsekiĝos.

– Mi proponas iri al ni. Tien – al florbedo! Tie estas tegmentita loko, ni sub ĝin ekmovis benkojn kaj kaŝiĝas kontraŭ pluvo. Kaj kiam pluvo finiĝas, ni ree kuregas laŭ parko. Ĉu vi iros?

La maljunulo ekspiris, verŝajne por graveco, leviĝis de benko kaj iris lamante kaj

ĉirkaŭirante flakojn al kuranta knabo al flanko de florbedo. Kaj la knabo laŭte kriis al tuta parko pri tio, ke nun “al ni maljunulo venos pri maro rakonti”... Areto de knaboj ĉirkaŭis benkon sub tegmentita loko, sur kiu la maljunulo sidis, kaj atente rigardis lin atendante rakonton.

– Mi proponas fari tiel, – li diris. – Mi povas rakonti pli multaj okazoj. Sed pli bone mi laŭtleĝos el tiu kajero. Ĉu bone? En la kajero pri multaj okazoj de mia vivo mi skribis.

– Jen kio vi konstante legas! Sed ni pensis, ke tio estas iaj preĝoj...

– Ne, ĉi tie mi konservas mian vivon. Por ke ne forgesi, kiam mi estos tre maljuna. Kaj poste aliaj homoj povos legi. Ĉu subite tio estas interese?

La maljunulo komencis foliumi flaviĝintajn paĝojn serĉante ion necesan.

– Ĉu vi parolis pri skafandristoj? Pri vezikoj en flako? Jen kion mi laŭtleĝos! Aŭskultu! – li movis per bastono en flako, en kiu vezikiĝis karbido, kiun iu elĵetis.

“Tri superaj leŭtenantoj staris apud oficira gastejo en unu balta urbo. Ili estis dandoj kun vangruĝaj vizaĝoj. Ilia uniformo estis kiel en bildo, faldo laŭ pantalonon estis tiaj akraj, ke oni povis tranĉvundi sin. Laŭ sorto ili okazis en tiu urbeto apud bordo de Balta maro ne por ekposedo de oceanaj profundoj. Ne. En la urbo estis lerna centro de subakva floto de Sovetio. Ŝipanaroj de tuta Sovetio periode alveturis al tiu centro, kie ne timante droni, dronigi sian aŭ alian ŝipon aŭ rompi ion la ŝipanaroj imitis per ekzerciloj kaj imitiloj diversajn situaciojn. Kaj pro tio ili plibonigis siajn spertojn sen malprofito de siaj submarinoj kaj de si propre.

Hodiaŭ ĉiuj lecionoj finiĝis, morgaŭ devas esti sabato. Sabato estis ne laŭ senco de tago de semajno, sed laŭ senco, ke en tiu sabato devis esti vera libertago, sen deĵoroj kaj vaĉoj, sen lecionoj kaj trejnadoj.

La superaj leŭtenantoj prepariĝis “diboĉi”. Malofte okazis, ke en tiu loko, kie kolektiĝis submarinanoj, forestis submarinoj, sed estis kafejoj, Domo de Oficiro kaj nemulte libero. Tempo estis soveta, “reorganiza”. Preskaŭ “seka leĝo” kaj limitigeo de amuzaj oficejoj en siaj militbazoj tiris al libero... Kaj en la urbeto libero estis. Kaj deziroj koincidis kun ebloj.

Tiu tri homo atendis la kvaran, kiu konstante malfruis ĉion kaj ĉiam. Kialo estis simpla – li estis tre dika. Pezaj partoj de korpo preskaŭ ĉiam alkroĉiĝis al io, ne penetris en ion, ŝiris en nekonvena momento uniformon per siaj dimensioj kaj kun knaro kaj ĝemo fleksiĝis por akcelo. La tri delonge estis preta ke startu al flanko de amuzaj oficejoj.

– Tiu Sergio ĉiam malrapide moviĝas. Dum ni atendas lin, en Domo de Oficiroj lokoj ne estos!

– Ne grumblu! Jen li jam aperis. La veziko en uniformo!

En ŝtupoj de peroneto aperis solida figuro de Sergio. Senriproĉa uniformo, brilaj pro “superrazado” vangoj, lipharoj de tritika koloro, ruĝa tufo kaj rideto en tuta vizaĝo proksimiĝis al la tri homo.

Tago estis novembra, vintro delonge venis al Baltio, neĝo estis multe. Vintro per ventoj “disŝmiris” neĝon laŭ teritorio de la urbeto kaj poste subite timis kaj malsekiĝis ĉion per pluvo.

Stratoj brilis kiel spegulo. De supre estis akvo, sub akvo estis glacio. Stratlampoj lumis tiun tutan belecon, donis al la beleco fantazian aspekton kaj kaŝis “specifikecon” de loka pejzaĝo – glacio estis nevidebla.

Kompanio – nun jam kvarope – pri io parolante iris al Domo de Oficiroj. Ili iris laŭ tiu akva-glacia strato.

Piedoj glitis, kaj Sergio konstante malantaŭiĝis. Li estis plej peza kaj plej malrapida. Sed li estis plej solida kaj penis konformi al aspekto. La triopo antaŭiĝis de li

kaj, rimarkinte pliiĝantan distancon, haltis apud ŝtupoj de Domo de Oficiroj, urĝigante la kamaradon.

Li glitis inter flakoj kaj neĝamasoj iufoje haltante, iufoje trotetante, kaj tio multe amuzis rigardantojn. Sed jen li eliris al malmola supraĵo, kaj lia irmaniero iĝis pli egala, aperis certeco kaj grandeco. Li forskuis palton kontraŭ ŝprucoj, kiujflugis el sub liaj propraj piedoj, manojn metis en poŝojn kaj fajfante komencis trairi lastan parton de vojo.

Okuloj de Sergio brilis pro antaŭĝuo de festo, lipharoj staris bataleme, irmaniero estis preskaŭ kiel en parado. El lipoj fluis melodio de “toreadoro”. Pasantoj komencis atenti lin. Li konsciis tion kaj ludis por publiko.

Subite dum vica paŝo piedo glitis al flanko, dua piedo sekvis al la unua, ambaŭ piedoj ne restis starantaj kaj...

Kaj korpo en admirataj rigardoj de publiko falis. Rekten. Per vizaĝo suben! Manoj de la belulo ne sukcesis eliĝi el poŝoj kaj nun, alpremitaj per korpo, penis eliĝi eksteren. Dum tio vizaĝo de la submarinano enakviĝis ĝis oreloj al flako. Gamboj konvulsiis, li provis stari almenaŭ sur unu genuo, manoj estis neŭtraligitaj, kaj provo ne sukcesis. La triopo ĝemis pro ridego rigardante kuŝantan per vizaĝo suben en flako kaj senhelpan baraktantan kamaradon. Sveltaj figuroj de superaj leŭtenantoj fleksiĝis pro ridego, kiam Sergio, verŝajne kompreninte senrezulton de siaj provoj, komencis voki por helpo. Sed krioj pri helpo ne estis, nur vezikoj en flako pli fortiĝante kaj pli malfortiĝante komprenigis, ke la homo ankoraŭ estas viva, kaj li ankoraŭ ion volas...”

– Li vezikiĝis kiel karbido en flako! – iu knabo ridis.

– Ne-e! Kiel skafandristo!!! – kaj knaboj laŭte ekridis.

– Eksilentu! Kio okazis plu?

“Stratlampoj kaj luno donis al tiu sceno kinan aspekton, kaj komikeco de situacio ne

